



ISRAELA ESPERANTISTO

ORGANO DE ESPERANTO - LIGO EN ISRAELO

P.K. 39004, TEL-AVIVO

N-ro ~~72~~ ⁷¹ 1980

71



האספרנטיסט הישראלי

בטאון הליגה לאספרנטו בישראל

ת.ד. 39004, תל-אביב

העורך: אלכסנדר מנור

חוברת ~~72~~ ⁷¹ א-1980

71

ENHAVO

Du "artefaritaj lingvoj"	R. Alberg	1.
La espero	L.L. Zamenhof (trad. A. Kaŝtan)	5.
32 jaroj de israela sendependeco	A. M.	6.
Skribmanieroj de verkistoj kaj literaturistoj	A. Manor	8.
Porkisto kaj reĝo	Ŝ. Marŝak (trad. S. Miz- eruha)	11.
La himno de la judaj partizanoj	H. Glik (trad. J. Hecht)	13.
Delikataj fingroj	R. Bondi (trad. J. Giladi)	14.
Patrino	J. Tuwim (trad. J. Balbin)	16.
Paradizo denove luebla	E. Kiŝon (trad. G. Ziegler)	17.
Unuaj rilatoj inter JFLI kaj Egiptio		19.
El nia Movado kaj agado		20.



ISRAELA ESPERANTISTO

ORGANO de ESPERANTO-LIGO

EN ISRAELO

P. K. 39004, Tel Avivo

N-ro 72, junio 1980

Ĉefredaktoro-

Aleksander Manor

redaktoro -

Josef Ŝemer

DU "ARTEFARITAJ LINGVOJ"

En 1887 naskiĝis Esperanto, la komunikilo kiu jam sukcesis kunligi milojn da koroj de sinceraj homoj en multaj landoj. En la sama jaro naskiĝis dua lingvo - la moderna hebrea lingvo. En 1887 loĝis en Jerusalemo infano, kiu havis du jarojn - li ĵus tiam komencis paroli. Lia nomo estis Itamar Ben-Jehuda, kaj li komencis paroli en la hebrea lingvo - la unua denaska parolanto de la hebrea de post du mil jaroj. Liaj gepatroj ne permesis al li eliri de la korto de la domo ĉar ili ne volis ke li aŭdu alian lingvon.

Al la du lingvoj alfiksis multaj skeptikuloj la etiketojn "artefarita" kaj "nenatura" kaj "neebla". Sed tamen la du lingvoj evoluis kaj plifortiĝis, pruvante la diron de Teodor Hercl, la fondinto de la politika cionismo: "Se vi nur volas, do tio ne estas legendo".

Verdire, la hebrea lingvo sukcesis ĝis nun en pli granda mezuro ol Esperanto, sed post ĉio, Esperanto agas sur tereno pli vasta ol la hebrea, kaj en tiu tereno Esperanto ja sukcesis multe pli ol volis kredi la diverstipaj dubantoj kaj skentikuloj.

Ni komparu ĉi-tie la disvolviĝon de tiuj lingvoj kaj ni rigardu, kiel ĉiu de ili aranĝiĝis kun la diversaj faktoroj kiujn iuj personoj nomis "artefaritaj" kaj "nenaturaj".

Antaŭ cent jaroj la hebrea lingvo estis "morta". Ne morta en la senco de la antikva egipta lingvo, sed morta en la senco ke neniu parolis ĝin en sia ĉiutaga vivo. Nur religiuloj kaj intelektuloj uzis ĝin, sed nur skribe, ne buŝe. Sed la forta nacionalisma volo, en ĉi kazo, ebligis revivigi la ĉiutagan uzon de "morta" lingvo. Nur unu alia popolo provis revivigi

sian ne-uzatan lingvon - la Irmandanoj. Sed tie, pro diversaj kialoj, la provo ne sukcesis.

Nu, ĉar la du lingvoj estis same kreitaj per la konscia volo de grupo da homoj, kaj en la sama epoko, estus interese vidi kiuj estas la paraleloj kaj la diferencoj en siaj evoluoj.

Unue, oni devas konstati, ke la hebrea havas avantaĝon kiu mankas al Esperanto. La hebrea parolantoj loĝas en unu kompakta loko kaj parolas unu al la alia ĉiun tagon. Zamenhof, en sia tempo, rimarkigis pri tia avantaĝo. Li diris ke pli grave estus por Esperanto havi, se eble, koncentrigitan grupon de ĉe nur kelkaj miloj ol havi vaste disigitan nombron de centoj da miloj.

Rilate al la ŝanĝoj en la du lingvoj ekde naŭdek jaroj, oni povas diri ke la hebrea ŝanĝiĝis sufiĉe, kaj en la gramatiko kaj en la vorttrezoro, dum Esperanto ne ŝanĝiĝis multe en la gramatiko, sed ja ŝanĝiĝis vaste en la vorttrezoro. En Esperanto ni gardis la integrecon de la gramatiko per konscia respekto de la Fundamento. Esence, oni trovas nur malgravajn ŝanĝojn en la ĝenerala lingvistika aspekto de Esperanto depost antaŭ naŭdek jaroj. Tiam oni trovis multajn personojn kiuj metis la adjektivon kutime post la substantivo. Nun la "batalo" por la loko de la adjektivo estas pasinta, kaj preskaŭ ĉiam oni trovas ĝin antaŭ la substantivo.

Oni rimarkas ankaŭ la eniron de novaj sufiksoj kiel "iv" kaj "esk" kaj "iz". Grava ŝanĝo estas la emo provi fari la esprimadojn malpli longaj. Oni adoptis ekzemple vortojn kiel "descendi" por servi flanke de longa vorto kiel "malsupreniri", kaj "pigra" flanke de "mallaborema", kaj tiel plu. Sed pri tiuj punktoj mi parolos malsupre kiam mi analizos la vorttrezoron.

Oni trovas la tendencon por mallongigo ankaŭ en la pli ofta uzo de "ĉi". Komence oni uzis ĝin nur en kombinoj kiel "ĉi-tiu" kaj "ĉi-foje", sed nun oni renkontas ĝin en esprimadoj kiel "ĉi libro", "ĉi personoj". Oni trovas ankaŭ tekstojn kun la mallongigo de la vorto "estas", precipe kiam oni citas konversacion, kiel ekzemple: "Mi 'stas preta."

En la nova hebrea lingvo oni vidas pli da ŝanĝoj en la gramatiko, kaj interese estas, de vidpunkto de la komparo kun Esperanto, ke multe de tiuj ŝanĝoj plilongigis la frazojn - ĝuste la kontraŭo kiel en

Esperanto. Oni ne volis konscie plilongigi esprimadojn, certe, sed oni volis simpligi la fleksiojn, kaj tio kaŭzis plilongajn formojn. Oni ensorbis en Israelon grandan nombron da nov-enmigrintoj, kaj oni devis instrui al ili la hebrea lingvon, kaj por faciligi la lernadon oni uzis "analizajn" formojn anstataŭ "sintezajn" formojn. En 1900, ekzemple, por "mia libro" oni diris "sifri", kaj nun oni diras "ha-sefer ŝeli". Kaj tiel kun miloj da similaj esprimadoj.

Du alij gravaj ŝanĝoj en la sintakso de la hebrea estas la preskaŭ totala malapero de la imperativo (oni uzas la futuron), kaj la preskaŭ totala malapero de la femal-plurala formo en la futuro.

En la sfero de la vorttrezoro la du lingvoj vidis tre grandajn ŝanĝojn, kaj tiuj ŝanĝoj instigis tre akrajn disputojn en ambaŭ lingvoj. La batalo estas inter la neologoj kaj la konservativuloj.

Ni lasu al Kalocsay, la granda neologo, karakterizi la diferencon inter la du vidpunktoj. "La Esperantistojn oni povas dividi en du grupojn, en propagandistojn kaj literaturistojn. La propagandisto volas facilan Esperanton, kiun li povas versi rapide, per tute eta funelo, en la kapon de ĉiu homo. Li estus la plej felika, se la lingvo konsistus el du cent vortoj, se oni povus skribi sur poŝtkarton la tutan gramatikon, kaj la tutan vortaron, kun la Himno. Li estus kontenta, se post sessemajna kurso ĉiu parolus flue kaj komprenus sen vortaro la kolektitajn verkojn de Shakespeare, Dickens, Wells kaj Shaw.

La literaturisto volas riĉan lingvon, volas havi apartan vorton por ĉiu vorto de sia nacia lingvo, apartan vorton por ĉiu nuanco, laŭeble radikvorton, ĉar la vortojn tro derivitajn kaj kunmetitajn li sentas artefaritajn, malfortajn, senkolorajn. La poeto volas multajn vortojn, por raketi per ili, por trovi per ili fresajn, neuzitajn rimojn... La poemtradukisto abomenas la kunmetaĵojn, ĉar ili estas tro longaj, malhelpas lin en lia vetkurado por mallongo." (El Literatura Foiro, Februaro 1980.)

En unu senco ankaŭ en la hebrea lingvo la neologoj celis al la sama rezulto kiel la neologoj en Esperanto: ili volis havi apartan vorton por ĉiu vorto en sia originala lingvo. Ĉar por la granda plimulto la hebrea estis ne denaska lingvo sed akirita. Ĉiu lernanto de dua lingvo ofte ĉagreniĝas kiam li vidas ke la lernata lingvo ne havas esprimadon kiu paralelas precize al vorto en sia propra lingvo, sed sufiĉe rapide li

4.

trovas tie aliajn esprimojn kiuj servas sufiĉe bone por la sama penso. Cetere li trovas ke en la lernata lingvo estas aliaj vortoj kiuj estas pli trafaj ol la paralelaj esprimaĵoj en sia lingvo. Pro tio li venas al la konkludo, ke "Mia lingvo estas riĉa kaj ankaŭ la dua lingvo estas riĉa."

Sed kaj Esperanto kaj la moderna hebrea estas "novaj" lingvoj. Esperanto estis kun konscie limigita vortaro por faciligi la lernadon. Kaj la hebrea trovis sin kun limigita vortaro en 1900, ĉar oni ne uzis ĝin en multaj kampoj de la vivo. En religia terminaro hebrea estis sufiĉe riĉa, sed en aliaj sferoj oni devis trovi aŭ krei milojn da vortoj. Komence de vortoj por infanaj rimajoj ĝis esprimaĵoj en ĉiuj fakoj de la moderna vivo. En la "ordinara kultura komunikado" la hebrea povis, kompreneble, esprimi ĉiujn ideojn, sed ne en la precize samaj pens-kadroj al kiuj estis al kutimiĝintaj la nov-enmigrintoj el Eŭropo. Pro tio la hebre-parolantoj de 1900 envenigis milojn da eŭropaj vortoj.

La puristoj levigis kontraŭ tiu "miksita lingvo" pro nacionalismaj kialoj kaj komencis batali kontraŭ ĝi. Iom post iom oni forigis multe de la fremdaj vortoj kaj anstataŭigis ilin per vortoj de autentaj radikoj hebreaj. Jen neprilaborita listo de ordinara eŭropaj vortoj kiujn oni kutimis uzi antaŭ kelkaj jardekoj kaj kiujn oni jam forigis. La juna generacio en Israelo jam ne komprenas la plimulton da ili: programo, problemo, industrio, konsekvenca, modo, kulturo, revolucio, ilustrado, impresario, mensa, eksporto, filmo, principo.

En Esperanto, certe, la sinteno al eŭropaj vortoj estas pli akceptema, ĉar ĉi tie ne funkcias la nacionalismo sed la internaciano. Sed ni certe konstatas, ke multaj vortoj ne estas tut-eŭropaj, kaj ankaŭ ni aspiras atingi ankaŭ la ne-eŭropanojn. Diris al mi lastatempe veterana Esperantisto de pola deveno: "Kreiĝas nun en Esperanto ia angla-franca dialekto, kiun mi tute ne komprenas."

La PIV estas sufiĉe malavara en la akcepto de novaj vortoj, sed oni trovas multajn publicistojn kiuj verkas eĉ sen atenti ĉu vorto troviĝas en PIV. Lastatempe mi trovis tiujn vortojn en la revuoj: diskrepanco, inkremento, manaĝanto.

La tuta problemo ne estas unu de la plej simplaj, kaj oni devos priatenti ĝin ankoraŭ dum longaj jaroj.

ROBERT ALBERG

5.

L A E S P E R O

D-ro L.L. Zamenhof

ה ת ק ו ה

מאת ד"ר אליעזר זמנהוף

1. שור, רגש חדש עולמנו יעיר. על ארץ רבה ירעים קול באדיר; ומכפר אלי כפר, מני עיר אלי עיר על כנפי רות-קל הוא יטוס וישיר.
2. לא ישיר שיר לחרב שפורת לדם, לא יקרא אלי כך את משפחת אדם. לתבל אפופת מלחמות מעולם הוא מבטיח הרמוניה קדושה לעולם.
3. אל מתחת לתו-התקוה המקודש נקבצים לוחמים לשלום מתקדש. וחיש צץ הרעיון וגדל ומגובש, שכן את האספרנטיסטים רכש.
4. באיתו, עתיקות, עוד עומדות החומות שחוצות לאמים, מפרידות בין אמות. אך נפץ תנפצן הקדושה באהבות, ובנפוצ, ונפלו המחצות העבותה.
5. ומבינים איש את אחיו ורעהו לעד, עת לשון ניטרלית מקשרתם לתד. יאוחו עמים בקהלים כי יחד חוג משפחה גדול ואחד.
6. למודי-הריצות חברינו הנם; בעבדם לשלום לא ייעפו חנם, כי אם עד חלום-אנושות מרומם לברכת-נצחים התגשם יתגשם

Trad. Haim Kaštan
kun helpo de N.Z. Maimon

תרגום חיים קשתן

En la mondon venis nova sento,
tra la mondo iras forta voko;
per flugiloj de facila vento
nun de loko flugu ĝi al loko.
Ne al glavo sangon soifanta
ĝi la homan tiras familion;
al la mond' eterne militanta
ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero
kolektiĝas pacaj batalantoj,
kaj rapide kreskas la afero
per laboro de la esperantoj.
Forte staras muroj de miljaroj
inter la popoloj dividitaj,
sed dissaltos la obstinaj baroj
per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento
komprenante unu la alian,
la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.
Nia diligenta kolegaro
en laboro paca ne laciĝos,
ĝis la bela sonĝo de l' homaro
por eterna ben' efektiviĝos.



32 JAROJ DE ISRAELA SENDEPENDECO

La ŝtato Israelo estis fondita la 14-an de majo, 1948. Tio estis la fino de longa procezo de luktoj de popolo kiu revenis al sia patrolando. Dum siaj tridek-du jaroj Israelo sukcesis efektiviigi multe de siaj konstru-celoj, kaj dum ĝia 31-a jaro de ekzistado estis subskribita la paco kun Egiptio.

Kiam estis fondita la israela ŝtato ĝi nombris 650,000 Judojn kaj 156,000 minoritatulojn. En la fino de 1979 troviĝis en ĝi 3,830,000 loĝantoj, de ili 3,212,000 Judoj kaj 618,000 ne-Judoj. La Leĝo de Reveno asertas, ke ĉiu judo posedas la rajton veni al Israelo kaj substrekas la nacian-historian karakteron de la ŝtato Israelo.

Tiu leĝo estas la rezulto de la longa nacia batalo fondi judan ŝtaton en Israellando, kaj dank' al tio enmigris en Israelon 1,600,000 Judoj, kvankam dum tridek jaroj de la brita mandato enmigris nur 453,000 Judoj. La kulmino en la enmigrado estis dum la jaroj 1948-1951, kiam venis preskaŭ 700,000 enmigrintoj. La plimulto de ili venis de Norda Afriko kaj Azio.

Nun estas ok urboj kies loĝantaro nombras pli ol 100,000 civitanoj. Precipe pligrandiĝis la tri grandaj urboj: Jerusalemo, Tel-Aviv-Jafo, kaj Hajfa, en kiuj troviĝas kune 955,000 loĝantoj. En Jerusalemo troviĝas 386,000, en Tel Aviv 338,000 kaj en Hajfa 229,000. En tiuj tri urboj estas 42% de la tuta loĝantaro.

Agrikulturo. Tiu ĉi branĉo progresis tre multe, kaj Israelo liveras agrikulturajn sciojn al multaj landoj en la mondo. La loka agrikulturo produktas pli ol tri kvaronojn de la lokaj nutraĵoj, per sep procentoj de la laborforto.

Industrio. La disvolviĝo de la industrio post la fondiĝo de la ŝtato estis unu de la plej rapidaj en la mondo, kaj ĝi okupis en 1979 36% de la ekonomia aktiveco.

Komunikado. Estis konstruitaj du novaj marhavenoj. La unua estis Eilat, ĉe la bordo de la Ruĝa Maro. Per ĝi disvolviĝis komercaj rilatoj kun la landoj troviĝantaj ĉe la bordo de la Hinda Oceano. La dua nova haveno estas en Aŝdod. La malnovaj havenoj de Jafo kaj Tel Aviv estis fermitaj en 1966. En Aŝkelon estis kreita nafthaveno. La nombro de israelaj komercaj ŝipoj estis 97 en 1978 (en 1948 nur ok).

La aviado. La nacia flugkompanio El-Al estis fondita tuj post la kreiĝo de la ŝtato, kaj ĝi posedas nun dekkvin Boeing-aviadilojn 707 kaj 747. La flughaveno de Lod je la nomo de Ben-Gurion, kiu estis inaugurita en 1936, estas la ĉefa israela flughaveno. En 1979 trapasis ĝin pli ol 2.8 milionoj da pasaĝeroj kaj 150,000 tunoj da varoj.

Edukado, kulturo, scienco. En 1949 venis la leĝo pri deviga edukado laŭ kiu ĉiuj infanoj de 5-14 jaroj ricevas senpagan edukadon. En 1978 decidis la registaro enkonduki senpagan instruadon en la mezlernejoj. En 1979 vizitis la lernejojn pli ol miliono da lernantoj.

La akademia edukado. Israelo okupas la kvaran lokon en la mondo (post Usono, Kanado kaj Rusio) laŭ la procento de studentoj en la universitatoj. Ilia nombro en 1979 estis 55,300 (1,560 en 1949). Antaŭ 1948 estis nur tri institutoj de alta edukado: en Jerusalemo, Hajfa, kaj Reĥovot (Vajcman-Instituto). De tiam malfermiĝis kvar novaj universitatoj: en Tel Aviv, Ramat Gan, Hajfa, kaj Beer-Seva.

Gazetoj. Aperas dudek-sep ĉiutagaj gazetoj, la duono da ili en la hebrea lingvo. Estas eldonataj 61 semajnaj gazetoj, 35 dusemajnaj gazetoj, 172 aperas unumonate, kaj 411 aperas neregule.

La scienco. La sciencaj atingiĝoj dum 32 jaroj montras, ke Israelo staras je tre alta scienca nivelo. Tre multe disvolviĝis la medicina kaj agrikultura esploroj, la eluzo de la sunenergio, kaj la sekurecaj esploroj, kiuj tre multe plifortigis la armeon.

Israelo estas unu de la ŝtatoj en kiuj la saneca nivelo estas de la plej altaj en la mondo. En 1948 estis en la lando nur 66 hospitaloj kun 4,620 litoj. En la fino de 1978 estis 135 hospitaloj kun 26,464 litoj.

Israelo kaj la juda popolo. La disvolvigon de Israelo oni ne povas imagi sen la materia kaj spirita helpo de la juda popolo en la diasporo. Israelo estas la ŝtato de la juda popolo kaj substrekas sian respondecon pri la sorto kaj rajtoj de ĉiu Judo en ĉiu loko en la mondo.



A. M.

SKRIBMANIEROJ DE VERKISTOJ KAJ LITERATURISTOJ

Multfoje ni demandas, ĉu same kiel la pentristo pentras per sia peniko kaj la skulptisto skulptas per sia ĉizilo, simile faras la verkisto kun sia plumo. Ĉu la aŭtora laboro estas laboro kiel ĉiu alia, ordinara tekniko, au ĉu ĝi estas speciala arto? Ĉu ekzistas sugestio aŭ inspiro eksteraj au internaj por verki? Kiel vekigās la deziro al literatura skribado?

La verkisto kiel ĝardenisto. Ekzistas verkistoj, kiujn motivigas la decido ordigi sisteme siajn pensojn, tiel forigante la internan konfuzon kaj ĥaoson. Tiel, ekzemple, skribis Winston Churchill en sia libro "La Dua Mondmilito". Li skribis, ke por direkti kaj okupi sian cerbon li planis skribi la historion ekde la traktato de Versaille. Li substrekas, ke verki libron estas same kiel gajni bonan amikon, al kiu vi povas vin turni ĉiam por ĉerpi konsolon kaj plezuron; kaj kiel nova kaj larĝa kampo de scivolo kaj interesiĝo ĝi lumigas ĉiujn vojetojn de la cerbo.

Tio signifas, ke laŭ Winston Churchill la verkado estas anima kuracado. Laŭ tiu vidpunkto la verkisto deprenas damaĝitajn pensojn el sia cerbo, same kiel ĝardenisto elŝiras trudherbojn de sia ĝardeno.

Kiel subteno de Churchill povas esti ankaŭ la opinio de la fama angla aŭtoro Anthony Burgess, verkisto de "La Meĥanika Orango" kaj dudek aliaj libroj. Li kutime diris, "Anstataŭ iri al psikologo-komencu verki." La homaj travivaĵoj estas konfuzitaj, kaj oni devas ordigi ilin.

Verkado kiel peza kaj laciga laboro. Multaj verkistoj konstatas, ke verkado estas tre malfacila laboro. Por la franca verkisto Flaubert la verkado estas sizifa fortostreĉo. La ŝvito fluis de lia frunto, kaj li elspiradis kvazaŭ li estus rulinta ŝtonegon al pinto de monto.

La fama usona romanisto kaj profesoro de literaturo Elen Lilcuk deklaris, ke la verkado estas simple laboro kiel ĉiu alia laboro.

Tomas Mann substrekis, ke verkisto estas tiu al kiu la skribado estas la plej malfacila laboro ol al iu ajn alia homo. Š. J. Agnon, la fama hebrea verkisto kiu ricevis Nobel-premion, asertas ke, li multe penadas je ĉiu vorto kaj frazo.



Formoj kaj manieroj de verkado. Multaj verkistoj rakontas, ke por komenci verki oni devas antaŭe sidigi centfoje ĉe la tablo kaj devigi sian plumon skribi senhezite, eĉ ne pensante pri kio, nur vidi en tio krudmaterialon por produkti valorajn.

Ibsen kutimis sidi multajn horojn ĉe sia tablo ĝis maturigis en sia kapo plano por teatraĵo. Ted Ĝejsel, la fama usona verkisto por infanoj, kies plumnomo estas Dr. Suess, diras, "Mia regulo estas sidi ĉe la skribtablo ok horojn ĉiutage, ĉu mi skribas aŭ ne. Post horoj de senlaboro pleniĝas mia cerbo per planoj kaj vidaĵoj kiujn mi notas kaj laŭ kiuj mi komencas verki."

La fama rusa infanliteraturisto Kornej Cukovski rakontas la jenon: "Milfoje mi sidigis ĉe la tablo pleniĝante foliojn per banalajoj kaj vulgarajoj, kaj finfine mi estis konvinkita ke mi ne havas talenton. Sed okazis ke mia malgranda filo malsaniĝis kaj mi veturis kun li nokte al urbo en trajno. Mi devis rakonti al li rakontojn por trankviligi liajn dolorojn. Kiam mia filo vekigis li petis ke mi rakontu al li la lastan rakonton." Kaj de tiu tempo komencis Cukovski skribi rakontojn por infanoj kiuj famigis lin.

La kvanto de forstrekoj estas pli granda ol la kvanto de skribado. Estas verkistoj, kiuj pli multe forstrekas ol skribas. Tolstoj transskribis sian libron "Milito kaj paco" sep fojojn. La fama juda-rusa verkisto Isak Babel kopiis kaj reskribis sian rakonton "La kozako Ljovka" dudek-sep fojojn! Li multe poluris ĉiun vorton. Ĉiun frazon li ekzamenis kelkfoje por forĵeti la nenecesajn vortojn. La juda-rusa verkisto Samuel Marŝak povis pleniĝi tutan stakon da folioj por ke en la 35-a pago restu nur kvar versoj! La juda verkisto kaj politikisto Aba Even plibonigas ĉion kion li skribas senfine kaj ĉiam li sentas ke la teksto ne estas ankoraŭ bona.

Instigoj kaj incitoj. Ĉu estas necesa inspiro por verki? Gustave Flaubert diris, ke "inspiro" estas nur "transpiro" ("ŝvito", en la franca lingvo). Voltaire trinkis kvindek glasojn da kafo ĉiutage kiel instigo por verki. John Stuart Mill dungis muzikiston por ke li ludu en la proksima ĉambro dum la verkado. Ĉehov verkis dum sia junaĝo starante ĉe la fenestro en densa kaj tumulta loĝejo. Goethe verkis en ĉambro fermita hermetike. Gogol, Robert Frost kaj Ernest Hemingway skribis starante. La

hebrea verkisto A. Kabak alkutimiĝis verki sidante sur rombita seĝo por ne ekdormi. Li diris, ke verkisto profundiĝante en sia kreado, similas al preĝanta homo.

Resumo. Ni konvinkiĝis, ke ankoraŭ ne formiĝis fiksitaj reguloj kaj leĝoj por krei verkadon, sed la ĝeneralajn principojn de kreanta skribado oni povas lerni de la sperto de diversaj verkistoj kaj literaturistoj. Tie ĉi ni malkovras, ke la unua teksto estas nur malnetajo, kruda materialo kiun oni devas poste multe poluri. Tio signifas, ke tiu kiu volas verki ne devas esti ŝparema dum la skribado, sed doni liberecon al siaj plumo kaj pensoj. Laŭ nia scio li povas fari tion nur kiam li estas konvinkita, ke li faras tion unue por si mem kun la celo ordigi siajn pensojn kaj emociojn kaj koncentrigi ilin je la centra vivcelo, kiu devas esti: kompletigi la verkadon de la ĝenerala naturo kaj de la homa naturo.

Ĉar la naturo kreis nur la vojeton de la vivo, kiu estas semita per diversaj dornoj kaj minoj, kaj la homo kun sia homa naturo devas kompletigi sian kompletan kreitaĵon kiel larĝan vivvojon, sekuran kaj malfermitan por ĉiuj kiuj gvidas kaj kondukas al reciproka fekundigo. Tio signifas kompletigo de la nekompletaj kreaĵoj de la naturo ĝenerale kaj de la kreaĵo nomata vivo speciale. Tio devas esti la ĉefa tasko de la homa verkado, kaj ĉiu homo estas alvokata partopreni en ĝi kaj kontribui sian parton.

ALEKSANDER MANOR



PORKISTO KAJ REĜO

Angla legendo

Ŝmuel Marŝak

Aŭskultu rakonton de l' tempo iama
pri reĝo tre brava, kuraĝa kaj fama.
Severe li reĝis, sidante sur trono,
Ne ŝatis li leĝojn, ne konis pardonon.

Kaj pluen aŭskultu. Proksima najbaro
al li estis la episkop' malavara.
Vivadis li lukse en plena feliĉo.
Lin oni titolis: "Riĉulo plej riĉa".

Pro lia riĉeco kaj ĉies favoro
lin vokas Londonon plej granda sinjoro.
Venigas lin nokte gardistoj severaj
por alta kortum' al Tamizo-rivero.

"-Saluton al Vi, episkopo humila!
Vivadas Vi ja ne modeste, sed brile.
Vi estas por Ni perfidulo gehena!
Ni Vin senrajtigas je mon' kaj bieno!"

Plorkriis al reĝ' episkopo mizera:
"-Ho, reĝo! Permesu nur diri la veron:
Al dio kaj homoj konate ja estas,
ke mi la riĉaĵon akiris honeste!"

"-Ne trompu. Nin vane, monaĵo Vi stulta!
Ja evidentiĝas, ke estas Vi kulpa!
Kaj sciu: senhalte forlasos Vi mondon,
se al tri demandoj ne donos respondon.

Aŭskultu demandojn:

Se mi sur la trono
kun sceptro en man' sidas sub ora krono
kaj kortegonar' sin apude spaliras,
nu, kiom mi kostas? Ĉu prezon Vi diras?

Ĉu povas Vi, due, respondi decide:
Trarajdos Terglobon mi kiel rapide?
Kaj tria respond' estu hasta, senĝema:
Pri kio nun pensas la reĝ' kompatema?

Mi donos al Vi dusemajnan templimon
Dum ĝi nur en korp' Via restos animo.
Vi, eble, pli saĝa al temp' tiu estos,
se dum dek kvar tagoj demandojn digestos."

Enigmoj de l' reĝ' episkopon teruras.
Li venas Kembriĝon, Oksfordon veturas.
Ho, ve! Eĉ nek unu saĝul' en Britlando
sukcesis respondi la reĝajn demandojn.




Travagis li vane dekunu jam tagojn
kaj gregon da porkoj renkontis ĉe lago.
Porkist' riverencis al li delikate:
"-Vi kiel bonfartas, sinjor' estimata?"

"-Malgajaj novaĵoj: la reĝ' min molestas.
Al mi por vivĝuo tri tagoj nur restas.
Se mi ne respondos demandojn de l' reĝo,
al lasta mi povas prepari min preĝo."

"-Sinjor', ne malĝoju, memoru regulon,
ke ofte stutul' povas helpi saĝulon.
Transdonu al mi la sutanon, bastonon,
kaj Vin anstataŭigos mi antaŭ la trono.

Mi estas porkisto kaj Vi - episkopo,
sed estas mi tute simila duopo.
Kaj mi ja memoras, ke dum infanaĝo
nin oni konfuzis pro niaj vizaĝoj."



"-Fidela paŝtisto, al Vi mi transdonas
sutanon kaj la episkopan bastonon.
Ho, fil' mia, gardu Vin saĝo de l' Dio!
Sed tamen foriru Vi haste hodiaŭ!"

Jen venis porkisto al reĝa palaco.
"-Saluton al Vi, Nia Patro aŭdaca!
Atendas Vin longe mi. Se Vi jam pretas,
sidiĝu. Mi tuj la demandojn ripetas.

Respondu rapide: Se mi sur la trono
kun scepro en man' sidas sub ora krono
kaj kortegonar' sin apude spaliras,
por mi kian prezon Vi do tiam diras?"

Al reĝo respondas paŝtist' kun impono:
"-Ne scias mi koston de l' trono kaj krono,
sed prez' Via de l' korteganoj dependas,
ja ili Vin ofte perfidas kaj vendas."

La reĝ' ekridetis: "Jen ruza fripono!
Ja estas unua respondo tre bona.
Nun duan demandon respondu decide:
Trarajdos la Teron mi kiel rapide?"

"-Apenaŭ la Suno leviĝos, foriru
kaj sekvi ĝin dum la tagnokto aspiru.
Ĝis nur faros plene la Ter' sian turnon
eluzos por vojo Vi unu diurnon."

La reĝo ridegis kaj poste kofesis:
"-Konsentas mi. Vi duan fojon sukcesis.
Do, lasta demando. Ĝi estu lakona:
Pri kio nun pensas la reĝ' Via bona?"

"-Nu, -diris porkist' kun ridet' filantropa,
Vi pensas, ke vidas Vi nun episkopon.
Sed sidas ĉi-tie porkisto modesta,
savinta de l' mort' episkopon honestan."
Esp. Smuel Mizeruĥa

LA HIMNO DE L' JUDAJ PARTIZANOJ EL VILNIUS

אל נא תאמר: תנה דרכי האחרונה

1. Neniam diru ke jam lasta via voj',
Nun helajn tagojn kovras nuboj de malĝoj'.
Alvenos tamen nia sopirata hor'
Eksonos niĉ' paŝ', eklumos nia glori'.

De l' verda sudo ĝis la neĝkovrita ter'
Kun nia trist' aperas ni, kun vesufer'
Kaj kie falas foje gut' de nia sang'
Elŝprucos nia fort', fier' de brava rang'.

3. Origos nunon nian brila sunmaten'.
Pereos nia hieraŭo de venen'.
Sed se malfruos la aŭror' de nova mond'
La kant' admone sonu daŭre dum l' estont'.

4. Ĉi - kanton sango skribis k' batala vol'.
Ne birdo en liber' ĝin kreis laŭ petol'.
Popol' ĝin kantis digne sur la barikad'
En son' de falegantaj muroj k' grenad'.

Tradukis laŭ Hirs Glik el la jida lingvo


Julius Hecht

Hirs Glik naskiĝis en jaro 1920 en la urbo Vilnius, luktis kiel partizano en la Vilnius -a getto; murdita de Germanoj en Koncentrejo Estona en sept. 1944.

La melodio de tiu ĉi himno estas larĝe konata k' kantata.

J. H.

Rut Bondi

DELIKATAJ FINGROJ

Dio kreis la plej gravan kreitaĵon, la homon, la virinojn kaj ĉar restis ankoraŭ iom da materialo kiun Li ne kuraĝis forĵeti, Li de la restaĵoj kunmetis ankoraŭ unu kreitaĵon: la virinon. Memkompreneble ke estas granda diferenco inter unuagrada produkto kaj duagrada kaj tiu diferenco evidentiĝas ĉe ĉiuj facetoj de la vivo, de politiko ĝis ŝoforado.

Estas laboroj, kiuj konvenas al la viro kaj laboroj, kiuj decas por la virino, kaj en neniu branĉo de laboro la limoj de kapableco tiom klare diferenciĝas, kiel ĉe dommastrumado. Lavi la manĝilaron, ekzemple, destinas la kreinto sendube por la virinoj; alie, Li ne estus kreinta vitron, porcelanon, ceramikon kaj aliajn rompeblajn ujojn. La solidaj kaj fortaj manoj de la viro, simple ne taŭgas por teni glason, por tremi ĝin,

Ankaŭ liaj vestoj kutime pruvos pri intencoj de la kreinto forteni lin de la lavopelvo. La kravato povus malkuŝi en la pelvo, la manumoj povas malpuriĝi en la fritilo. Kaj ne ekzistas pli ilustrita pruvo, ke la manĝilaro apartenas al la virino, ol la antaŭtuko delikata, malpeza, multkolora, virina vestaĵo specifa same kiel korseto aŭ aretefari-taj cilĵoj.

Lavi la plankon estas sporto por la korpo de virino: Tion asertis jam Jean Renuar, kaj li sciis kion li diris. Nur elasta virina korpo kapablas kuniĝi por elpreni la ping-pong pilkon de sub kanapo, kiu subbruliĝis tien. Nur ŝiaj maldikaj manoj povas atingi la orangŝelojn kaŝigantajn en la angulo malantaŭ la ŝranko.

Kaj tute logike estas, ke tiuj delikataj manoj, kiuj malpuriĝis lavante la plankon, estu purigotaj lavante tolaĵojn. Estus simple neĝentile flanke de la viro forpreni de sia edzino la ĉarman manflegadon per sapo-polvo kaj sapoflokoj, kiuj gardas ŝian molan haŭton, kiel solene promesas la diversaj reklamoj. Kaj ĉar varma vaporo estas la plej efika rimedo por purigi la haŭton, li ne aŭdacas forpreni de ŝi la gladadon de la tolaĵoj. Kaj eĉ se ŝi ne posedas vaporgladilon, ankaŭ de la varmo eligita el ordinara gladilo havas bonefikan utilon, kiel ĉiu amanta viro povas konvinkiĝi facile: Antaŭ la gladado-pala, verdeta, post la gladado-ruĝa, ardanta.

Ankaŭ la nuntempaj medicinlibroj konfirmas la malnovan veron: La plej efikajn rimedojn por ĉiuj doloretaj donas al ni la naturo. Ajlo, cepo, kukumo, avokado, lakto, feĉo, - ĉiuj aĵoj efikas bonege fortigante la malfortan korpon de virino. Viro, kiu zorgas pri la sanstato de sia edzino, donas al ŝi okazon kontakti tiujn benitajn aĵojn. Ju pli multe la edzino pasigas la tempon kuirante, des pli sana ŝi estas kaj kion pli povas deziri al si amanta edzo ol sanan edzinon ĉe sana bifesteko?

Unu el la laboroj, kiu estas kvazaŭ "stampita" por virino estas porti rubaĵon al la rubujo en la korto. Sufiĉas atenti la aspekton de la malgranda sitelo, farita el plastiko, malpeza kun delikataj paŝtelkoloroj, por konvinkiĝi, ke ĝi simple apartenas al la virino. Se iu estus imaginta, ke viro estus ĝin portanta, per siaj fortaj manoj, sendube oni ĝin fabrikus per mezuroj kaj koloroj konvenaj por lia atleta staturo.

La viro estas kreita por grandaj laboroj, produktivaj, respondecaj. Miksi koktelon, plenigi glasetojn per trinkaĵo; ankaŭ funkciigi la elektran gramofonon apartenas al la familiestro, ĉar la maldikaj fingroj de la edzino povas (gardu - Dio) pikvundiĝi per la akra pinto de la nadlo. Kaj kien povas konduki tia simpla piko, jam montris la legendo pri la dormanta belulino. Profunda legado de la "Playboy", krio al la infanĉambro: "Aŭ vi dormu, aŭ mi..." kaj dispecigado de grajnoj postulas tutan viron.

Sed la plej vireca funkcio estas la ŝoforado. Ne ekzistas hormono donanta al viro absolutan senson de supereco ol virino ŝoferanta. Virino en la stirilo estas ridinda, komika kaj precipe danĝera al la publiko, escepte, se oni devas veturigi la onklinon al la stacidomo, preni la litkovrilojn el la purigado, aŭ veturi kun infanoj al la naskiĝtagfesto. En tiuj okazoj povas eĉ la plej vireca viro paciĝi kun la konscio, ke li transdonis la stirilon al virino, kiam li estas alforĝita al la fotelo, algluita al sia libro kaj lia koro estas zorgoplena pri bonfarto de sia plej kara, t.e. sia aŭtomobilo.

Esp. J. Giladi

Aldono: La verkinto de tiu ĉi felietono, Rut Bondi, estas fama israela ĵurnalistino. Ŝi skribas felietonojn en la ĉiusemajna literatura suplemento de la ĵurnalo "Davar" nomata "Davar Haŝavua". Parto de ili aperis libroforme en la du volumoj "Estos Bone" kaj "Duona Konsolo".

16.

NEKROLOGO

La 16-an de Ijar, 5740. (2. V. 1980) akcidentfale forpasis la jerusalema esperantista aktivulo, s-ro. OVADJA KUK.

Estis li 63-jaraĝa, ano de la multnombra familio Kuk, al kies sino apartenas famaj rabenoj. Modesta oficisto, tre ĝentila kaj agrabla homo, li estis sindonema esperantisto kiu gvidis multajn kursojn.

Li restos en ĉiama memoro de ĉiuj parencoj, konatuloj kaj samideanoj.

Sinceran kondolencon al la vidvino kaj la familioj de liaj du filoj.

J. KOHEN-CEDEK

JULIAN TUWIM (1894 - 1953)

I. P A T R I N O

En la lodza tombejo,
En la tombejo juda,
Tombo de mia patrino,
De mia patrino juda.

La tomb' de pola patrino,
de mia panjo judina,
For de Vistul mi ŝin portis
Al bord' de Łodka uzina.

La tombon ŝtonego premas,
Kaj sur la ŝton' paliĝinta
El la betul' defalinta
Laŭra foliaro kuŝas.

Kaj kiam venteto suna
Kun ĝi ludetas ore,
Ĝi kunmetiĝas dekore
En la ordenon Polonia.

II

Mortpafis ŝin faŝisto,
Kiam ŝi pensis pri mi,
Mortpafis ŝin faŝisto,
Ĉar ŝi sopiris post mi.

Ŝarĝis - mortpafis sopiron,
Denove kuglon enigis,
Por ke poste... - sed poste
Nenion plu povis mortigi.

De l' panjo mondon trapafis:
Du karesplenaj silaboj,
Kadavron fenestre elĵetis
Sur sanktan teron de slavoĵ.

Rememoru, filo mia!
Ankaŭ vi nepo, nepino!
Ke plenumiĝis la vorto:
"L' ideal' tuŝis pavimon".

17.

Mi portis ŝin de l' glorkampo,
Redonis al patrintero...
Sed la kadavr' de mia nomo
Ĝisas en ties viscerero.

el -la pola tradukis

JULIUS BALBIN

Gloso -

Łodka - (pole) Łódka, industria antaŭurbo de Lodzo, dua plej granda urbo de Pollando.

Efraim Kiŝon

PARADIZO DENOVE LUEBLA

Post tridek-jara propra ŝtateco kaj pro proksimiĝanta centjaro min okupas realigo de malnova revo: Pafi per raketo du israelajn astronautojn en la kosmon. Kial do ne? Ni ja scias, ke en la atmosfero ĉiuj pezaj objektoj perdas sian graviton. Oni tie povas forĵeti malplenajn botelojn kaj skatolojn senĝene.

T e l e f o n o f o b i o

Grandioza ideo: Oni bonvolu imagi, kiel ĉio povus eventi: Komandanto Vaicman, nia unua astronauto, en sia plej bela sabata uniformo - luebas inter steloj en sia astroŝipo "Golda I" nur havante kontakton per radio kaj oksigena gumtubo, dum ni tie ĉi povas aŭskulti sur la tero jenan dialogon inter li kaj gvida ŝipo:

"He, hola! Parolas komandanto de "Golda I". Ĉu vi aŭdas min?"

"Parolas Vaicman. Mi aŭskultas."

"Kiel vi fartas?"

"Bonege!"

"Ĉu la instrumentoj funkcias?"

"Unike."

"Kian eksteran temperaturon vi havas?"

"Ne pertelefone, mi petas!"



Ĝuste tiel ĉio eventos. El nia sperto ni povas certigi tion. Tiu evento ne povos okazi alimaniere. Kial israela astronauto ne suferu tipe israelan neŭrozon, kiu sin manifestas per simptoma "ne pertelefone, mi petas" en la aŭskulti-parolilon. Ĉiu telefona dialogo en Israelo iam finiĝas per ĉi tiuj kvar vortoj. Mi telefonas al Vajnreb kaj interparolas kun li pri ĉio ajn. Subite, kiam la momento ŝajnas taŭga al mi, mi diras al li:

"letere, Vajnreb, kiam vi repagos al mi tiujn 1000..., kiujn mi prunte donis al vi?"

Post tia demando mi unue aŭdas nenion kaj nur poste flustran voĉon de Vajnreb:

"Ne pertelefone, mi petas."

Supoze ke lia respondo ne sufiĉas mi kaj mi pro tio rekrias: "Kial do ne, Vajnreb? Kial ne pertelefone? Kial ĝuste ne pertelefone? Pro kio, he?" - "Mi havas miajn motivojn," tekstos lia konscia respondo.

"Kiajn motivojn, je la diablo? Diru al mi, kiajn motivojn vi havas!"

"Ne pertelefone, mi petas."

Mi povus malesperi. Sed kio motivigas homojn tiel agi? Ĉu temas pri ĝenerale umanta historio pro sekuro aŭ pri juda timo pri provo-kantoj? Neniu scias tion. Ĝis nun oni nur eksciis, ke israelano demandita dum telefona interparolado de alia israelano pri ciferoj, doganaj leĝoj aŭ tarifoj, impostoj, kartludoj, mono, nomoj, vojaĝoj eksterlanden k.s. tuj eksilentas kaj finas tian dialogon per "ne pertelefone, mi petas." Eble ĉi nacia fatalo pro tio ke en griza biblia iamo de supre voĉo de Dio eksonis jene: "Ĉu vi ne manĝis de tiu arbo, pri kiu mi ordonis, ke vi ne manĝu de ĝi?" Sed Adamo respondis: "Ne pertelefone, mi petas!" Probable ĉi unua telefonado kaŭzas ĉiujn pluajn ĝis hodiaŭ.

Trad. Gerhard Ziegler



UNUAJ RILATOJ INTER JELI KAJ EGIPTIO


Post la kreigo de oficialaj rektaj poŝtrilatoj inter Israelo kaj Egiptio, JELI (Junulara Esperanto-Ligo Israela) skribis al keklaj egiptaj samideanoj, celante establi reciprokajn amikajn rilatojn inter egiptaj kaj israelaj esperantistoj.

Ĝis nun ni ricevis unu respondon: Esperantisto loĝanta en la urbo Aleksandrio sendis al JELI aerpoŝtan leteron, kies koverton ni aperigas ĉisube. Tiu ĉi letero estas verŝajne la unua letero en Esperanto sendita el Egiptio rekte al Israelo.

Ni esperas ke sekvos ĝin plia korespondado kaj ke inter la samideanoj el ambaŭ landoj kreskos amikecaj rilatoj, same kiel estis en la tridekaj kaj kvardekaj jaroj de tiu ĉi jarcento.

AERE
Par Avion



JUNULARA ESPERANTO-LIGO ISRAELA


سائر الزمن وتعلم لغة مصر
الذي فيه تمشي، لغة وضعها عقل
مفكر نخرجت إلى حيز الوجود
آية من آيات الإعجاز في السهولة
والمنطق وعدوية اللفظ .

أطلب دروس المراسلة من
مندوب هيئة الاسبرانتو الدولية
ص ب ١٢٢١ - القاهرة

IL 61-220 TEL-AVIV
P.O. Box. 22041

EGYPT

ISRAELO



EL NIA MOVADO KAJ AGADO

Klubaj Vesperoj

J. Ben Alter	La verkoj de Perec
Debato: H. Mašler R. Alberg	Religio en nia tagoj
A. Vandel	Junular-konferenco en Germanio
A. Manor	Laboro de verkistoj
M. Braĥa	Esperanta poezio
A. Ron	Hindio kaj la okcidento

Biblioteko de ELI

La biblioteko de ELI troviĝas en Bejt Jad Lebanim, str. Pinkas 63, Tel Aviv. Ĝi funkcias unu fojon semajne: ĵaŭdon, je la horoj 19.00 - 19.30, antaŭ la semajna kunveno de la Tel-Aviva klubo.

Rajtas pruntepreni librojn - kontraŭ modesta kaŭcipago - ĉiu membro de ELI.

Dum la lasta jaro ni aĉetis por la biblioteko novajn librojn. Ĉar kelkaj el tiuj libroj kostas multe pli ol la kutima kaŭcio kiun la legantoj pagas (50 IL), la Estraro de ELI decidis preni por tiuj libroj aldonan kaŭcion, kiun oni ricevos tuj post la redono de la libro, laŭ jena listo:

1. La kaŝita vivo de Zamenhof (N. Z. Maimon) 400 IL
2. Kiel akvo de l' rivero (R. Schwarc) I 300 IL
3. " " " " " " II 300 IL
4. Baza krestomatio (Benĉik) 300 IL
5. El la verda biblio (I. Lejzeroviĉ) 200 IL

J. GILADI

Jarkotizo por ELI/ Abontarifo por IE

Ciuj israelaj legantoj estas afable petataj pagi la jarkotizon por ELI-membreco (180 IL aŭ 18 IS, inkl. abontarifon).

Kromaj monkontribuoj estos ricevitaj kun granda danko.

Abontarifo por eksterlandaj legantoj: 10 internaciaj respondkuponoj aŭ egalvaloro.

NI GRATULAS

ELI gratulas s-anon S. Zalmanovic kaj lian edzinon okaze de la edziĝo de ilia filo.



ANONCO

Aperis la dua eldono de la DULINGVA LERNOLIBRO POR MEMLEKONTO de Dvora Sor, korektita, plibonigita, kaj ŝanĝita. Ĝi enhavas aldone apartan vortareton. Fakte la tuta libro estas aŭtomate ampleksa vortaro, ĉar ĉiuj instru-frazoj aperas paralele en ambaŭ lingvoj. Kaj variigas la enhavon la riĉa literatura temaro, destinita por legado kaj diskutado.

La prezo estas 130 liroj. (Por studentoj - 120 l.) La libro estas ricevebla ĉe Dvora Sor, Sd. Benjamin 14, Netanja, aŭ en la klubejo ĉe s-ano Giladi kaj ĉe s-ano Drezner en Tel Aviv.

VOLAS KORESPONDI

Yoshio Imai, Oonishi-cho, 1-10-30, Amagasaki-shi, Japanio, 35 jara bibliotekisto, interesiĝas pri la vivo de hebreoj en Eŭropo antaŭ la dua mondmilito, volas komenci studi la jidan lingvon kaj literaturon, serĉas iun kiu lin helpos la studadon.

Tunĉinek Štěpán, str. Husova 644, 749 01 Vitkov, okres Opava, Ĉeĥoslovakio kaj volas interŝanĝi bildkartojn purajn kaj uzitajn.

Mark Patterson, PO Box 903, Wanganui, Nov-Zelando, 19-jara studento de lingvoj kaj fiziko, interesiĝas pri Israelo kaj hebrea lingvo.

Antonin Bombionka, Sokolovská 1178, 708 00 Ostrava Poruba IV, Ĉeĥoslovakio, 45 jara, pri muziko klasika kaj popola, kolektas pupojn vestitajn en naciaj kostumoj.

Kåre Jensen, Strandgt. 21.3700 Skien, Norvegio, 59 jara, interesita pri Israelo. Kolektas poŝtmarkojn.



Amikeco trans limoj